NIA PONTO


Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: J.Miguel García Iturrioz (tepgaitj@lg.ehu.es)

Kunven-tago: Vendredo (7,30-9 h.)
☎ 34-944.164.492
☎ portebla: 34-658.709.087
esperantobilbao@terra.com

TTT-ejo: http://www.geocities.com/esperantobilbao

Jar-kotizoj: Normala: 17 ∈. Speciala: 14 ∈. Familia: 30 ∈.
BBK-konto: 2095-0141-41-2218001550

JANUARO/FEBRUARO 2005 **Nro. 58 (1/05)**



La plej juna esperantistino de Bilbao partoprenas la Z-feston

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Laŭ postulas la statutoj de nia Asocio, ni kunvokas ĉiujn ĝiajn anojn partopreni la ordinaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la **vendredon 4an de marto**, je la 19 h. (unua alvoko), aŭ **je la 19,30 h.** (dua alvoko) laŭ la ĉi suba tagordo:

1.- Aprobo, se estas konsento, de la protokolo de la lasta Ĝenerala Kunsido (01/10/2004).
2.- Prezento kaj aprobo de la ekonomia stato de la Grupo: el- kaj en-spezoj dum 2004.
3.- Prezento kaj aprobo, se estas konsento, de la buĝeto por la nuna jaro 2005.
4.- Nomumo de nova estraro.
5.- Informoj far de la estraro.
6.- Demandoj kaj sugestoj.

RECUERDA: El viernes 4 de Marzo, Asamblea General, a las 19,30 h. (en 2ª convocatoria), con el siguiente Orden del Día:

1.- Aprobación, si procede, del acta de la Asamblea General anterior (01/10/2004).
2.- Aprobación, si procede, del resumen de gastos e ingresos correspondiente al año 2004
3.- Aprobación, si procede, del presupuesto para el año 2005.
4.- Nombramiento de la nueva Junta Directiva.
5.- Informaciones diversas por parte de la Junta Directiva.
6.- Ruegos y preguntas.

FORPASIS ...

La 6an de decembro 2004 forpasis, 79-jara, nia amiko **Pedro Sánchez Esteras**. Li esperantiĝis jam sufiĉe aĝa, en la jaro 1992, plena de entuziasmo. Ofte li partoprenis niajn kunvenojn, ĝis kiam aliaj okupoj forrabis lian tempon.

La 12an de januaro 2005 forpasis, 82-jara, **Pedro Valle Martín**, unu el la fondintoj de la E-Grupo de Bilbao en ĝia nuna lasta epoko, kiam Ĝi ekmarŝis, en la jaro 1953, post la malpermeso de Esperanto sekve de la hispana intercivitana milito. Li plurfoje apartenis al la estraro de nia asocio kaj, malgraŭ ke, lastatempe, ne tro ofte vizitis nin, ĉiujare aperis, antaŭ Kristnasko, por aĉeti tutan blokon de loterio, kiun li dissemis inter siaj konatuloj kaj parencoj.

Cobro de recibos del año 2004.

Si a la izquierda de estas líneas aparece una "X" es que aun no has hecho el pago de la cuota correspondiente al año pasado, 2004.

El número de cuenta, en la BBK, es: **2095-0141-41-2218001550.**
Y las cuotas anuales:

Normal:	17,00 euros.
Especial:	14,00 euros.
Familiar:	30,00 euros (única, para todos los miembros de una misma familia).

Por otra parte, ya comenzado el año 2005, se puede hacer el ingreso de la cuota de este año. Quien desee domiciliar el pago, no tiene más que hacernos llegar su número de cuenta; en breve, pasaremos al cobro los recibos.

Premios de la lotería de Navidad.

El número que jugábamos en la pasada lotería de Navidad resultó premiado con el reintegro de la cantidad jugada, es decir, 2,50 euros por cada boleto. El pago, en efectivo, se realiza en nuestra sede de Barrencalle Barrena, los viernes, de 19,30 a 21,00 h. Os recordamos que el último día de pago será el viernes 18 de Marzo.

NIA SOCIARO...

Dum la jaro 2004,

ALIĜIS:

574	VERGARA ROSA, María	2004-08-06
575	LEZEA LAFUENTE, Katixa	2004-10-20
576	SARRIONANDIA-IBARRA FERNÁNDEZ,Santi	2004-10-20

REALIĜIS:

416	Iciar Arteche Urrutia
518	Peru Iñaki Ruiz Opitz


EKSIĜIS:


CARCEDO GONZÁLEZ, Cristina	Ne pagis kotizon
GARCÍA ASENJO, Merche	Ne pagis kotizon
SANTAMARÍA del CAMPO, Juan	Ne pagis kotizon
AGUILAR SAN MILLÁN, Ander	Ne pagis kotizon
BARRIO PÉREZ, Carlos	Ne pagis kotizon
URAGA RODRÍGUEZ, Andrés	Ne pagis kotizon
GALLEGO MOYA, Juan Manuel	Propravole
SÁNCHEZ ESTERAS, Pedro	Mortis

Tiel, je la fino de 2004, nia Asocio nombris 72 membrojn.


ZAMENHOFA FESTOTAGO.

Kiel tradicie, la 17an de decembro ni celebris la naskiĝdatrevenon de la kreinto de Esperanto, L.L. Zamenhof





Jesús M. García Iturrioz, Prezidanto de la E-Grupo de Bilbao, donacas libron al la instruistoj de la nuna lernojaro, **Eduardo Larrouy** kaj **Patxi de la Hoz**, dum dankas, nome de la Asocio, ilian sindonemon.



Parto de la partoprenantoj en la zamenhofa festo. Inter ili, Irina Grigorieva kaj ŝia edzo, Angel García, kiuj veturis el Santander; ankaŭ ni havis bulgaran gaston, kiu vizitis Bilbaon en tiuj tagoj.

VENONTAJ E-ARANĜOJ.

25/28 marto.	Boulogne sur Mer. 100-jariĝo de la 1ª E-kongreso.
02/09 jul.	Zagreb (Kroatio). 78a SAT-Kongreso.
??/?? jul.	Guadalajara?, Alcalá de Henares?, Madrid?, ... Kongreso de Hispana E-Federacio (HEF) (ankoraŭ ne decidite)
23/30 julio.	Vilno (Litovio). 90a Universala Kongreso de UEA.
30 jul/05 aŭg.	Kaunas (Litovio). 38a Konferenco de ILEI.
31 jul/07 aŭg.	Zakopane (Polio). 61a Internacia Junulara Kongreso (IJK)

50 jaroj da oficiala agnosko - kaj kio sekvis?

Antaŭ 50 jaroj la Esperanto-movado post longa laborado atingis unu el siaj plej grandaj venkoj ĝis nun. Vendrede la 10-an de decembro 1954 la ĝenerala konferenco de Unesko en Montevideo akceptis rezolucion, kiu rekomendas, ke la ĝenerala direktoro de Unesko sekvu la evoluon en la uzado de la lingvo. Post ankoraŭ 23 jaroj, ĝenerala direktoro de Unesko efektive unufoje vizitis Universalan Kongreson de Esperanto, sed la eksperimento ne ripetiĝis. Legu pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org
Raportis: Kalle Kniivila <kalle@esperanto.se>.

(Prenita el retagentejo NUN. 09/12/2004)

Projekto de rezolucio de 90-a UK en Vilniuso-2005

En Apudvistula bulteno de Krakova Societo Esperanto juĝisto d-ro Bronislaw Kieres publikis la projekton de Rezolucio de venontjara UK, en kiu oni skribas "Ni, sube subskribitaj, surbaze de Artikolo I.46.4 de Konstitucio de Europa Unio alvokas la Eŭropan Komisionon por ke ĝi proponu al Eŭropa Parlamento projekton de leĝo, laŭ kiu Esperanto estos la oficiala pera lingvo de Eŭropa Unio". Oni devas kolekti por tiu ĉi projekto 1 milionon da subskriboj de civitanoj de la 25 ŝtatoj-membroj de EU, do ĉirkaŭ 40 mil en ĉiu lando. Adreso de la menciita bulteno: str. I. Krasickiego 18 31515 Kraków. POLLANDO.
Raportis: Stanislaw Smigielski <stansmi@neostrada.pl>

(Prenita el retagentejo NUN. 15/12/2004)

Nova babilejo

Ekde kelkaj tagoj la retpaĝaro de Ĝangalo.com ne plu funkcias. Multaj esperantistoj ĉiutage blogis, diskutis kaj babilis tie. Nun ni trovis almenaŭ alian babilejon, por ke ni babilintoj povas denove renkontiĝi tie. Se vi volas, iru al http://www.pirch.com/chat/index.php
Raportis: Marko76 <maxe76@arcor.de>

(Prenita el retagentejo NUN.09/01/2005)

Vikipedio plej furoras en la esperanta reto

Vikipedio plej furoras en la esperanta reto. La plej populara esperantlingva retejo dum la jaro 2004 kredeble estis Vikipedio, kun proksimume 3 000 vizitoj ĉiutage. Populara estis ankaŭ Ĝangalo, kies servilo ĵus kolapsis pro tro da vizitoj. La teamo de Ĝangalo promesas, ke la retejo reviviĝos la 12-an de januaro. Ie meze en la statistika komparo troviĝas UEA kun 760 vizitoj tage. Malpli popularaj estas la retejoj de SAT kun 22 vizitoj tage kaj de la Esperanta Civito kun mezume 11 vizitoj ĉiutage dum la lastaj du jaroj.
Legu Pli en Libera Folio! http://www.liberafolio.org
Raportis: Kalle Kniivila <kalle@esperanto.se>

(Prenita el retagentejo NUN.10/01/2005)

Handzlik: 'Esperanto utilus al EU'

En ekskluziva intervjuo donita al Libera Folio la unua esperantista ano de la Eŭropa Parlamento, Malgorzata Handzlik, rakontas pri sia laboro. La nova posteno komplete ŝanĝis ŝian vivon: 'Ĉiusemajne lunde mi flugas al Bruselo aŭ Strasburgo kaj revenas ĵaŭde nokte. Vendrede, sabate kaj dimanĉe mi kutime estas en Pollando. Tiam okazas multaj renkontiĝoj kiujn mi devas partopreni. Foje mia familio venas por kelkaj tagoj al nia Brusela loĝejo.' Laŭ ŝi, uzo de Esperanto povus doni multan utilon al la Eŭropa Parlamento kaj al la Eŭropa Unio.
Raportis: Kalle KniivilÃ¤ <kalle@esperanto.se>

(Prenita el retagentejo NUN.01/02/2005)

Magistra disertacio favora al Esperanto.

La 1an de februaro magistriĝis ĉe la universitato de Utrecht, Nederlando, la studentino pri la angla lingvo Emily van Someren per disertacio pri lingvaj kaj tradukaj problemoj en Eŭropa Unio. En sia anglalingva verko Emily alvokas EU serioze konsideri Esperanton kiel laborlingvon kaj investi monon por ĝia evoluigo kaj pretigo por tiu rolo. Wim Jansen, docento pri interlingvistiko kaj Esperanto c'e la universitato de Amsterdamo, mentoris la magistrigon.
Raportis: Wim Jansen <Jansenwimh@cs.com>

(Prenita el retagentejo NUN.01/02/2005)

Poŝtmarko pri Petr Ginz

La ĉeĥa poŝto eldonis poŝtmarkon omaĝe al ĉeĥa juda knabo Petr Ginz (1928-1944), kiu pereis en Auschwitz kaj pri kiu NUN jam informis. La poŝtmarko estas videbla je la adreso http://kosmos-news.kosmo.cz/ginz-znamka.htm. Samtempe aperas en la ĉeĥa originalo taglibro de Petr el la koncentrejo Terezin, kiu konserviĝis. La verkon eldonigis lia fratino Ĥava Pressburger, kiu subskribos ĝin en Prago la 8-an de februaro. La libro estas videbla je la adreso: http://www.trigon-knihy.cz/antik.htm Ŝi planas trakon en la anglan kaj hebrean.
Raportis: Miroslav Malovec <malovec@chello.cz>

(Prenita el retagentejo NUN.01/02/2005)

NE FORGESU ...

Ke ni kunvenas ĉiun vendredon, de la 19,30 ĝis la 21,00 h., en la sidejo de la E-Grupo. En la sama tago, de la 19,00 ĝis la 20,30 h., disvolviĝas elementa kurso, gvidata de Patxi de la Hoz.

Vi ĉiuj estas invitataj partopreni kaj la kunvenon kaj la kurson. La venonta Ĝenerala Kunveno estos bona okazo por viziti nian sidejon kaj renkonti malnovajn konatulojn.

NIAJ AKTIVULOJ ...



ALLENDE ZABALA, Victor Olegario (1869-1943)

Vojinĝeniero, li esperantistiĝis en 1904a, kaj kunfondis la "*Grupo Esperantista de Bilbao*"-n (1906), kies unua Vicprezidanto li estis.

Dum jaroj, li strebis por disvastigi Esperanton en Vaskolandon, kaj partoprenis en la unuaj Universalaj Kongresoj reprezentante Hispanujon. En ili li ĉiam elstaris pro sia inteligento kaj saĝaj praktikaj proponoj.

Li ne nur senlace propagandis nian aferon, sed ofte gvidis kursojn kaj verkis artikolojn. En 1916a, li pilgrimis de urbo en urbon, al la plej gravaj esperantistaj fokusoj, por konvinki la plej elstarajn esperantistojn de Hispanujo pri la fondo de Hispana Esperanto-Konfederacio.

Li estis unu el la redaktoroj de "*Bilbao Esperantista*" kaj "*Nova Sento*", Prezidanto de la Vaska Esperantista Federacio en 1917a, kaj tradukis la famajn belajn legendojn de Bécquer "*La Miserere*", "*La monto de l' animoj*" kaj "*La sekaj Folioj*", kiujn oni publikigis felietone. Li ankaŭ estis Lingva Komitatano.

(El "Analoj de la Esperanta Movado en Hispanujo" de A. Marco Botella. Zaragoza 1987)

LA "DEKLARACIO DE BILBAO" TRADUKITA AL VASKA LINGVO.

Danke al la demarŝoj de nia senlaca samideno Eduardo Larrouy, la "Deklaracio de Bilbao", aprobita dum la lasta EEU-Kongreso, estis profesie kaj fake tradukita de la *Instituto Vasco de la Administración Pública (IVAP)*, aŭtonoma institucio de la Vaska Registaro.

Nekredeble kaj, malgraŭ ke la kongreso okazis en Bilbao, ankoraŭ mankis tiu lingvo, ĉar ne ĉiuj kuraĝis fari la tradukon de tiu iom faka deklaro. Tiel, la vaska aldoniĝas al la aliaj lingvoj de EU, en kiuj jam aperis tiu "Deklaracio de Bilbao".

2006 !!!

LA E-GRUPO DE BILBAO 100-JARIĜOS